

Oni parolas pri unu-ligaj kaj du-ligaj verboj:

Unu-liga: ILEI-anoj laboras.

Du-liga: ILEI-anoj plenumas projektojn.

Nun la demando: kia verbo estas **ilei** ?

Ŝajne ĝi estas unu-liga, kaj tiu ligo estas ĝuste la



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj!

Neklarigeble, la signifo de tiu kara verbo ankoraŭ ne aperas en PIV. Por la sekva eldono, jen la proponata difino, kun ekzempligaj frazoj:

Ile/i (ntr.) Aktivi en ILEI: *Estas homoj kiuj ~as ĉiutage. Plej agrable estas ~i komune. Ripetaj instigoj de amikoj kune kun la konstato ke edukado en Esperanto vere progresas kaj gravas, jam ~igis min. Mi jam multon atingis depost mia ~iĝo. ☛ kontribui, utili, sukcesi.*

Kelkaj utilaj manieroj **ilei** :

- Membriĝi jam nun en la Ligo por 2010, kaj rekomendu membrecon al amikoj kaj kolegoj kiuj interesiĝas pri edukado aŭ konstatas ĝian gravecon.
- Vizitadi hejmpaĝojn kiel www.ilei.info, www.edukado.net, www.lernu.net, kaj tiujn de niaj sekcioj; lasu komentojn, kontribuu materialojn; aktivu diskutliste.
- Partopreni sekciajn kaj aliajn edukrilatajn aranĝojn – aŭ organizu proprajn! Kunlaboru en sekciaj projektoj.
- Ĉerpi el nia reeldonita *Manlibro pri Instruado de Esperanto* por akiri utilajn konsilojn por viaj kursoj kaj instruado. Anoncu tiujn kursojn internacie; ligu kursanojn trans limoj, gvidu ilin al ekzamenoj kaj la esperanta vivo!
- Aliĝi al la 43a konferenco en Matanzas, Kubo, kaj rekomendu ĝin al aliaj.
- Aboni la revuon *Juna amiko* kaj abonigu aliajn, precipe el kursoj kaj grupoj.
- Plusendi ILEI-komunikaĵojn kaj prezentu la ligon en naciaj kongresoj, regionaj kaj lokaj kluboj, en junularaj aranĝoj kaj en konvenaj ekstermovadaj forumoj.
- Membriĝi en komisiono de ILEI aŭ fariĝu kunlaboranto. Se vi ne trovas konvenan komisionon, proponu la starigon de nova!

Kontaktu vian sekciestron aŭ nian kasiston, Julija Batrakova, por membriĝi hodiaŭ.

Pagojn sendu al la konto de ILEI ĉe: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855 IBAN: NL55INGB0004676855 BIC: INGBNL2A, aŭ al la konto de UEA: ilek-a.

Ileu kun ni !